BEL informas

n-ro 06/2014

la 22an de februaro 2014 | *22 de fevereiro de 2014*

UEA - Brazilo - Ĉefdelegita ŝanĝo

UEA - Brasil - Mudança de delegado-chefe

Letero de James Piton, eks-ĉefdelegito:

Carta de James Piton, ex-delegado-chefe:

"Dum dek jaroj, post nia karmemora Symilde Ledon, mi okupis la rolon de Ĉefdelegito de UEA por Brazilo. Tio estas pli ol sufiĉa tempo por sperti havi kontakton kun la brazila delegitaro, unu el la plej vastaj en la Delegita Reto de UEA.

Dankon al ĉiuj, kiuj dume afable sin prezentis por tiu pli ol centjara rolo de delegiteco kaj servas kiel reprezentanto de UEA en sia urbo aŭ fako. Dankon ankaŭ pro la demandoj kaj proponoj, ĉiam kun amikeca aliro.

Mi fieras esti en tia rondo, ĉar se mi lasas la ĉefdelegitecon, mi plu agos, i.a., kiel vicdelegito en mia urbeto kaj pri miaj fakoj. Mi instigas vin pensi pri engaĝiĝo en la Delegitan Reton, se vi ankoraŭ ne estas en ĝi.

"Por dez anos, em seguida à nossa saudosa Symilde Ledon, desempenhei o papel de Delegado-Chefe da UEA para o Brasil. Isso é tempo mais que suficiente para experimentar o contato com a delegação brasileira, uma das mais extensas na rede de delegados da UEA.

Obrigado a todos os que, por sua vez, gentilmente se apresentaram para esse papel centenário, o de delegado local da UEA em sua própria cidade ou área. Obrigado também pelas perguntas e sugestões, sempre com uma abordagem amigável.

Tenho orgulho de estar em tal círculo, porque, mesmo deixando o posto, ainda trabalharei como vice-delegado na minha cidade e nas minhas especialidades. Convido-os a pensar sobre o engajamento na

Al la kolegoj, plu tenu tiun prezentantecon, mi petas, kaj subtenu mian posteulon, Emilio Cid.

Rede de Delegados, caso ainda não estejam nela. Aos colegas, mantenham-se nesse papel de representação e peço que apoiem meu sucessor, Emílio Cid.

Nia nova Ĉefdelegito de UEA por Brazilo, Emilio, estas nomo konata pro tio, kio plej gravas: liaj ĉiam freŝaj ideoj kaj valoraj faroj por nia E-komunumo, la brazila kaj la internacia. Sukceson kaj agrablan sperton al vi, kara Emilio!

Nosso novo Delegado-Chefe da UEA para o Brasil, Emílio, é um nome conhecido pelo que é mais importante: as suas ideias sempre novas e trabalhos valiosos para as nossas comunidades, a brasileira e a internacional. Que seja para você, Emílio, uma experiência agradável e de sucesso!

Kun amika saluto kaj je via dispono,

James Piton (Paulínia-SP)”

Com um saudação cordial e a seu dispor,

James Piton (Paulínia -SP)”

BEL Informas ĝojas disprezenti tiun leteron kaj kungratulas kaj salutas nian novan ĉefdelegiton.

BEL Informas

BEL Informas tem o prazer de divulgar esta carta e congratula nosso novo delegado-chefe.

BEL Informas

BEL en Porpaca Ekumena Ceremonio

BEL estis sukcese reprezentita en la Porpaca Ekumena Ceremonio, kiu celebris la Mondan Tagon de Religio kaj la Nacian Ago-Tagon kontraŭ la Religia Maltoleremo, en la lasta 21-a de januaro, en la ĉefurbo de Brazilo, en la Templo de Bona Volo.

BEL em Ato Ecumênico pela Paz

A Liga Brasileira de Esperanto foi representada com muito sucesso no Ato Ecumênico pela Paz, que celebrou o Dia Mundial da Religião e o Dia Nacional de Combate à Intolerância Religiosa, no último dia 21 de janeiro, na capital do Brasil, no Templo da Boa Vontade.

Tiuokaze la prezidanto de BEL, Evandro Avellar, paroladis al la invititoj kaj ĉeestantoj pri la misio kaj graveco de Esperanto kiel ponto-lingvo kaj poste ricevis la salutojn de la ĉeestantoj pro la bonfaroj, kiujn Esperanto estigas al la komprenigo kaj paco inter la diversaj segmentoj de la socio.

Na ocasião, o presidente da Liga, Evandro Avellar, discursou para os convidados e para a plateia, discorrendo sobre a missão e importância do Esperanto como língua-ponte e depois recebeu os cumprimentos dos presentes, pelos benefícios que o Esperanto proporciona ao entendimento e à paz entre os diversos segmentos da sociedade.

Legu la plenan raporton, kun fotoj de la evento, kiu okazis en la navo de la Piramido de Bona Volo en Braziljo ĉe:

www.boavontade.com/eo/spiritualeco/ekumena-ceremonio-markas-la-monda-tago-de-religio-en-la-brazila-cefurbo

LBV

Leia a reportagem completa, com fotos do evento, que se deu na bela nave da Pirâmide da Boa Vontade em Brasília:

www.boavontade.com/eo/spiritualeco/ekumena-ceremonio-markas-la-monda-tago-de-religio-en-la-brazila-cefurbo

LBV

IJK 2014: unua rabato-periodo finiĝas februare

IJK 2014: primeiro período de desconto termina em fevereiro

Ĝis la fino de februaro eblos pagi la plej bonprezan kotizon por partopreni la IJK-n en Fortalezo. Kontrolu la prezojn ĉi tie:

Até o fim de fevereiro é possível pagar os melhores preços de inscrição para o IJK em Fortaleza. Verifique os preços aqui:

ijk.brazilo.net/aligho/kotizo/

Aliĝon oni faru pere de tiu formularo:

ijk.brazilo.net/aligho/alighilo/

Se vi estas juna brazilano, konsideru partopreni nian konkurson por vojaĝi senpage:

esperanto.com.br/jovem

BEJO/IJK-LKK

ijk.brazilo.net/aligho/kotizo/

Inscrições devem ser feitas por este formulário:

ijk.brazilo.net/aligho/alighilo/

Se você é brasileiro e jovem, considere participar de nosso concurso para viajar de graça:

esperanto.com.br/jovem

BEJO/IJK-LKK

Atenton! BEL Informas volas scii: kiuj estas niaj venontaj eventoj?

Sennombro da eventoj okazas en Brazilo dum la tuta jaro. Parto de la misio de **Brazila Esperanto-Ligo** estas ilin disvastigi al ĉiuj, kaj ***BEL Informas*** estas komunikservo je la dispono de nia tuta komunumo. Sendu al ni novaĵojn pri eventoj en via regiono - miloj da homoj scios pri ili kaj igos ilin sukcesaj pere de nia ***BEL Informas***.

Ni atendas viajn informojn!

Atenção! O BEL Informas quer saber: quais são nossos próximos eventos?

São inúmeros os eventos de Esperanto no Brasil durante todo o ano. Uma das missões da **Liga Brasileira de Esperanto** é divulgá-los, e o ***BEL Informas*** é um serviço que está à disposição de toda a comunidade. Contenos de eventos em sua região - milhares poderão inteirar-se deles e garantir seu sucesso com nosso ***BEL Informas***.

Estamos aguardando!

Klaku ĉi tie por scii kiel sendi viajn novaĵojn.

Teamo de BEL Informas

Clique aqui para saber como enviar suas novidades.

Equipe BEL Informas

Aliĝu al niaj komunumoj ĉe Facebook kaj Google +

Conecte-se a nossas comunidades no Facebook e Google +

BEL invitas: vizitu kaj ŝatu nian paĝon ĉe facebook!

BEL convida: visite e curta nossa página no face!

www.facebook.com/brazilaesperantoligo

Ĉu vi jam realiĝis al BEL ?
Você já se refiliou à BEL ?

Novaj en via BEL@Butiko:

Novos em sua BEL@Butiko:

Folhetos "Quem fala Esperanto fala com o mundo"

Pacotes de 100, 250 e 500 exemplares.

Apenas R$ 16,00, R$ 37,00 kaj R$ 70,00!

50-a BKE - Inscrição no 50º Congresso Brasileiro de Esperanto, janeiro de 2015, Rio de Janeiro. Diversas categorias!

belabutiko@esperanto.org.br

www.belabutiko.esperanto.org.br

Francisco Mattos
belabutiko@esperanto.org.br

Ni laboru kune!

Boletim bilíngue da Liga Brasileira de Esperanto
Dulingva bulteno de Brazila Esperanto-Ligo

SDS Ed. Venâncio III Sala 303, Brasília - DF, CEP 70.393-902
Telefones: (61) 3226-1298 Fax: (61) 3226-4446

Kunlaborantoj: Affonso Soares, Anna Lobo, Antonio Felix, Bert Schumann, Carlos Pereira, Diego Ribeiro, Emmanoel Lima, Emilio Cid, Eurípedes Barbosa, Evandro Avellar, Evandro Caboclo, Fabiano Henrique, Fabio Monteiro, Fabio Santos, Fernando Maia, Flávio Gomes, Francisco Mattos, Joe Bazilio, Luís Guilherme Jardim, Márcio Santos, Paulo Nascentes, Paulo Sérgio Viana, Rafael Zerbetto, Walter Fontes, Wesley Jefferson.

Sendu kontribuojn al bel.informas@gmail.com

Ricevu BEL Informas per via retadreso
Receba BEL Informas em seu email

www.esperanto.com.br/bel